45a Jaro - N-ro 5a - Decembro 1953

# BELGA ESPERANTISTO

DUMONATA REVUO, OFICIALA ORGANO
DE
REĜA BELGA LIGO ESPERANTISTA
Asocio sen profita celo,
aliĝinta al UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO
Socia Sidejo : 106, rue Général Lotz, Bruselo

Ĉefredaktoro :
Maur. JAUMOTTE
Avenuo De Bruyn, 44
Wilrijk-Antverpeno



LA MOZPONTO DE FRAGNEE EN LIEGO,
URBO DE LA SEKVONTA
BENELUKSA ESPERANTO-KONGRESO

# REĜA BELGA LIGO ESPERANTISTA

106, rue Général Lotz, Bruselo

— ASOCIO SEN PROFITA CELO —

Statutoj : *Moniteur Belge - Belgisch Staatsblad*, n-ro 115, 27 Junio 1936.



## HONORA KOMITATO

S-ro Frans VAN CAUWELAERT,
Prezidanto de la Deputitaro.

S-ro J. VAN HOUTTE,
Ĉefministro, Deputito.

S-ro Achille VAN ACKER,
Eksĉefministro, Deputito.

S-ro Robert CATTEAU,
Vic-Prezidanto de la Senato, Skabeno de Bruselo.

S-ro Lode CRAEYBECKX,
Urbestro de Antverpeno, eksministro, Deputito.

S-ro Georges MAZEREEL,
Senatano.

S-ro Georges MICHELET,
Honora Direktoro de la Komerca Ĉambro de Bruselo.



**BELGA ESPERANTO - INSTITUTO**
povas vin provizi
per KRISTNASK- kaj
NOVJARKARTETOJ
Mendu : Oostenstraat, 26
Antverpeno (Pĉk : 1689.58).

ZAMENHOF - TAGO
Libro - tago
KRISTNASKTAGO
Donactago



# BELGA ESPERANTISTO

OFICIALA ORGANO DE REĜA BELGA LIGO ESPERANTISTA

45a Jaro — Decembro 1953 — N-ro 5a


## La Fenikso renaskiĝos

Tiu ĉi artikolo enhavas adiaŭon... nè adiaŭon de la redaktoro al liaj legantoj, sed al nia revuo, en sia nuna formo kaj formato.

Ĝis nun, « Belga Esperantisto », eldonaĵo de Reĝa Belga Ligo Esperantista, estis redaktata de nur kelkaj el ĝiaj membroj.

Estonte, ĝi restos la oficiala organo de la Ligo ; sed ĝi estos redaktata kaj komune eldonata de pluraj Ligoj, kiuj decidis, — antaŭ kelkaj semajnoj, — unuiĝi siajn klopodojn, por alveni al pli malmultekosta, pli praktika, kaj do pli fruktodona laboro.

Okaze de la Pentekosta Kongreso en Antverpeno, tri Ligoj el Nederlando kaj Belgujo faris komunan klopodon, kiu estas kronita per la plej kompleta sukceso : sukceso laŭ la nombro de la partoprenintoj ; sukceso laŭ organiza kaj programa vidpunkto ; sukceso ankaŭ laŭ financa rilato, ĉar ĉiu Ligo rikoltis tre favoran saldon el la Kongresa Kaso.

Nun, tiuj ĉi tri Ligoj faris, kun la Svisa Esperanto-Societo, interkonsenton pri komuna redaktado kaj kompoŝtado de artikoloj, komunikoj, k.t.p., kiuj estos presataj sur la samaj presiloj kaj eldonataj en kvar apartaj revuoj, kiuj tamen prezentos al siaj legantoj grandparte identan materialon.

Tiu labormaniero devigis kompreneble la kvar Ligojn adapti siajn eldonaĵojn al iu komuna formato. Sed, dank' al tiu kunlaboro, ni sukcesos havigi al niaj legantoj, pojare, almenaŭ DEK samampleksajn numerojn, anstataŭ kvin aŭ ses, kiel ni, per niaj propraj rimedoj, ĝis nun povis presigi.

Ni estas certaj, ke niaj membroj taksos, je ĝia vera valoro, la efikon de tiu kunlaboro inter la Nederlanda Asocio L.E.E.N., la Svisa Societo, Flandra Ligo kaj Reĝa Belga Ligo Esperantista kaj ke ili, kun ni, ĝojos pro la akirita rezultato.

Se efektive, « Belga Esperantisto » en nuna formo malaperas, estas nur por tuj renaskiĝi pli grava, pli bela, el siaj cindroj, kiel la Fenikso !

*
* *

Aldonu ni al tio ĉi, ke inter la estraroj de Flandra Ligo kaj Belga Ligo estas starigita, sub prezidanteco de D-ro Kempeneers, BELGA CENTRA KOMITATO ESPERANTISTA, kiu akordiĝos la propagandon en nia lando ; kiu faros en ĉies nomo la paŝojn ĉe la oficialaj instancoj kaj kiu invitas ĉiujn aliajn esperanto-organizaĵojn en Belgujo aliĝi al tiu speciala, nacia E.K.I.

Simbole, la Prezidantoj kaj du estraranoj de ambaŭ Ligoj reciproke aliĝis kiel membroj al la alia Ligo, montrante tiel al la esperantistaro en nia lando ke, se, — pro oportunecaj kialoj — ekzistas en Belgujo du Ligoj laborantaj sur iom sama tereno, tio tamen okazas ne en ne-amika, eĉ ne en nur indiferenteca atmosfero, sed en plena akordiĝo de ĉiuj, kies celo estas la venko de Esperanto.

Maur. JAUMOTTE.

# Reĝa Belga Ligo Esperantista, a. s. p. c.

## Alvoko

Tiu ĉi numero de la revuo estas la lasta de la jaro kaj post kelkaj tagoj la jaro cetere finiĝos, ankaŭ la kotizjaro de Reĝa Belga Ligo Esperantista.

Tio pripensigas nin kaj pripensigos ankaŭ vin, ke la momento alvenis, kiam ĉiu devos repagi sian kotizon.

Ĉiu faru tion kiel eble plej akurate, laŭ la tabelo, kiun li trovos sur la kvara kovrilpaĝo ; prefere al sia grupa kasisto aŭ, se li estas izolulo, al la P.Ĉ.K. de Belga Ligo.

*

### Administrantara Kunsido de la 7a de novembro.

Tiun ĉi kunsidon ĉeestis : S-roj D-ro P. Kempeneers, prezidanto ; Maur. Jaumotte vicprezidanto ; H. Sielens, ĝenerala sekretario ; J. Soyeur, sekretario ; S-ino J. Plyson, kasistino ; F-ino S. Obozinski kaj s-roj Paulus, Pilloy, Poupeye, Van den Bossche kaj Verstraeten, geadministrantoj, dum S-roj Grootbaert kaj Vandevelde, senkulpigis sin.

Ĉe la komenco de la kunsido, D-ro Kempeneers, prezidanto, faras gravan deklaron, laŭ kiu li, okaze de la ĝenerala jarkunsido de 1954, ne plu akceptos la renovigon de sia mandato de prezidanto. Diversaj, ĉefe profesiaj cirkonstancoj malebligas al li la daŭrigon de tiom streĉa laboro.

De nun, li petas siajn kolegojn pripensi la aferon kaj li faras varman alvokon al la antverpena grupo « La Verda Stelo », la plej grava sekcio en Belgujo, por ke ĝi klopodu daŭrigi la tradon de la Ligo laŭ bona vojo : des pli ĉar S-ino Plyson, kiu jam de longe intencis eksiĝi kiel kasistino, samtempe deziros esti anstataŭita.

S-ro Jaumotte, surprizita pro la neatendita deklaro de D-ro Kempeneers, ne volas fari komenton en la nuna momento, esperante ke oni povos poste repriparoli tiun aferon kaj igi la prezidanton al rekonsidero de lia decido.

D-ro Kempeneers dankas pro tiuj vortoj, sed deziras tamen aldoni ke tiu rekonsidero nè estos ebla.

*Financa situacio* : El la kelkaj ciferoj komunikataj de la prezidanto, nome de la kasistino kaj kiuj rilatas al la financa stato ĉe tiu ĉi jarfino, montriĝas, ke Belga Ligo havas posedajon ĉe la P.Ĉ.K. de pli ol Fr. 15.000 kaj bonhavon ĉe UEA, de preskaŭ Fr. 6.000.

*Membraro* : Je tiu ĉi momento, kaj temas pri preskaŭ definitivaj ciferoj, la membronombro dum la jaro 1953a kreskis per unu unuo.

*Beneluksa Kongreso* : La provizora programo estos submetata al la proksima administrantara kunsido.

*Antaŭkongreso en Antverpeno* : S-ro Jaumotte anoncas ke la L.K.K. de la Antverpena Beneluksa Kongreso intencas daŭrigi sian laboron, per organizo, de la 28a ĝis la 30a de julio proksima, de Antaŭkongreso al la Universala Kongreso en Haarlem, kaj al kiu ĝi invitus ĉeesti la partoprenontojn el diversaj landoj, pli speciale la anglojn, francojn, italojn, germanojn, kaj ĝenerale tiujn, kiuj survoje al Haarlem, trairos nian landon kaj nian metropolon.

*Unesko-Komisiono* : La prezidanto de UEA S-ro Malmgren publikigis leteron per kiu li alvokas ĉiujn esperantistojn en la mondo al financa kunlaboro por « Fondaĵo Montevideo », kiu permesos sendi al la Ĝenerala Konferenco de Unesko, okazonta en Montevideo dum oktobro-novembro 1954a, observanton de nia esperanto-movado, kiu verŝajne estus D-ro Lapenna.

*Eŭropa Konsilantaro* : Tri pliaj ricevatestoj de la raporto Herrmann, venis de delegitoj ĉe la Eŭropa Konsilantaro de Strasburgo, nome de S-roj F. Van Cauwelaert, prezidanto de la Ĉambro de Deputitoj ; H. Heyman, ŝtatministro, kaj Bohy, deputito.

*« Centra Interliga Komisiono »* : La administrantaro decidas, ke S-roj Kempeneers, Jaumotte kaj Sielens, kaj eventuale kvara delegit(in)o, ĉeestos la preparan kunsidon en Mehleno, kie tiuj ĉi delegitoj renkontos la reprezentantojn de Flandra Ligo ; kaj donas al tiuj ĉi la necesajn povojn por diskuti kaj trafi unuajn decidojn, i.a. pri la fondo de « interliga Komisiono » kaj pri la komuna eldono de la revuoj.



# Belga Centra Komitato Esperantista

Sabaton, la 14an de novembro, okazis en Mehleno unua kunveno de delegitoj de nia Ligo, kun komisiitoj de Flandra Ligo Esperantista.

Ties rajtigitaj delegitoj estis : S-roj Debrouwere, prezidanto, D-ro Van Gindertaelen kaj Maertens, sekretario de Fl. L..

Tiuj de Belga Ligo estis : D-ro Kempeneers, prezidanto ; S-roj M. Jaumotte, vicprezidanto kaj H. Sielens, ĝenerala sekretario.

Dum tiu ĉi kunsido kaj post vigla interŝanĝo de diversaj opinioj kaj ideoj, estis decidata la starigo de BELGA CENTRA KOMITATO ESPERANTISTA, inter ambaŭ Ligoj, sed eventuale alirebla al aliaj organizaĵoj en la lando.

Jenaj honoraj oficoj estas aljuĝataj :

Prezidanto : D-ro Paul Kempeneers.

Vicprezidantoj : S-roj Debrouwere kaj M. Jaumotte.

Sekretarioj : S-roj Maertens kaj Sielens.

Komuna administranto de la revuoj : D-ro T. Van Gindertaelen.

La adreso de B.C.K.E. estos ĉe la prezidanto : Belgisch Centraal Esperanto-Comité, Generaal Lotzstraat, 106 Ukkel - Comité Central Belge d'Espéranto, 106, rue Général Lotz, Uccle.

* * *

Tuj la novstarigita Komitato priparolis la estontan kunlaboradon :

1. *Eldono de Komuna Gazeto* : La Komitato decidas presigi komunan gazeton (formato de Flandra Esperantisto duoniĝita aŭ de Belga Esperantisto duobligita) kun, laŭbezone du aŭ tri apartaj paĝoj por la ligaj sciigoj. La detaloj estos pridiskutataj en speciala kunveno de S-ro M. Jaumotte kaj D-ro Van Gindertaelen.

2. *Kongreso en Lieĝo* : Flandra Ligo komunikas, ke ĝia estraro akceptis la proponitan L.K.K. por la Beneluksa Kongreso 1954a en Lieĝo. D-ro Van Gindertaelen estas indikita kiel delegito de Fl. Ligo en tiu L.K.K.

3. *Antaŭkongreso en Antverpeno* : La L.K.K. de la Beneluksa Kongreso 1953a en Antverpeno prenas sur sin la respondecon por la organizo de antaŭkongreso en tiu urbo, de la merkredo ĝis la vendredo antaŭ la Universala Kongreso de Haarlem (do : de la merkredo, 28an ĝis la vendredo, 30an de julio 1954a).

La sekretaria adreso estas : S-ro Sielens, Houwerstraat, 12 Antverpeno.

4. *U.E.A.* : Nome de ambaŭ Ligoj la

## La intergrupa Konkurso

Por la jaro 1952a, estis la Brusela Grupo Esperantista, kiu gajnis la premion de la « Fondaĵo Jennen », per 116,7 % kompare al 1951.

La intergrupa konkurso donis, por la jaro 1953a kaj kompare al 1952a, rezultaton laŭ kiu la plej malgranda grupo aliĝinta al la Ligo — tiu de Verviers — gajnas la premion.

La fakto ke tiu grupo, la antaŭan jaron, atingis nur la 50 % de la poentoj de 1951 montras ke, kiam oni volas, ĉiu grupo, eĉ tre malbonfarta, povas restariĝi. Kaj ni esperas ke la Kongreso en Lieĝo dum 1954a estos okazo por tiu ĉi Grupo ankoraŭ plifortigi siajn poziciojn.

Jen la provizoraj komparaj ciferoj :

| % akiritaj | en 1952 | en 1953 |
|---|---|---|
| Verviers | 50 % | 175 % |
| Bruĝo | 83,3 % | 115 % |
| Antverpeno | 110,6 % | 108 % |
| Charleroi | 74,4 % | 97 % |
| Gento | 100,8 % | 90 % |
| Bruselo | 116,7 % | 87 % |

La premio mem estos transdonata al la Verviersa Grupo dum la Kongreso de Lieĝo.

Ni substreku ke, entute, Belga Ligo, enkalkulante la izolajn membrojn, konservis, kaj plialtigis eĉ per unu unuo, la nombron de sia membraro, dum la enspezitaj sumoj por kotizoj kaj donacoj ankaŭ restis fakte la samaj.

Kaj nun ĉiu preparu sin por nova laboro... la enkasigo de la kotizoj de la malnovaj membroj kaj la aligo de novaj !

# Beneluksa Kongreso 1954a

**Lieĝo : 5-6-7an de junio.**

Principe, dum la Kongreso en Antverpeno, la tri organizintaj Ligoj interkonsentis daŭrigi sian komunan agadon.

Pro la fakto ke en 1954a la Universala Kongreso okazos en Haarlem, la Nederlanda asocio « L.E.E.N. » tamen ne volis, nek povis promesi fari tre specialan propagandon por nacia aŭ eĉ por beneluksa Kongreso dum la venontaj pentekostaj tagoj.

Ni en nia lando plej bone komprenas tion, ĉar ni mem, en 1928, okaze de la XXa Universala Kongreso en Antverpeno, rezignis pri la organizo de nacia Kongreso tiun jaron, por ne malhelpi multnombran aliĝon al la granda kaj pli interesa Kongreso.

L.E.E.N. tamen promesis principan kunlaboron kaj estas ekster dubo ke, malgraŭ la cirkonstancoj, diversaj, se ne multaj nederlandaj amikoj, speciale el la orienta parto de la lando, vojaĝos Lieĝon je Pentekosto 1954a.

Efektive, — post pridiskuto en la respektivaj administrantaroj, — Belga Centra Komitato Esperantista firme decidis organizi komune la proksiman Kongreson en la valona Arda Civito.

Kaj niaj amikoj el la tuta ĉirkaŭaĵo de Lieĝo jam eklaboris : Ili kunmetis Lokan Kongresan Komitaton, kiun prezidos la simpatia kaj konata amiko el Spa, kiu tiel bone organizis la Kongreson en 1950 : S-ro J. Desonay.

S-ro D-ro T. Van Gindertaelen kaj verŝajne S-ro P. M. Mabesoone, kiuj funkciis kiel vicprezidantoj en la antaŭa L.K.K., konservos tiun postenon en la nova L.K.K., kiel reprezentantoj de Flandra Ligo kaj L.E.E.N.

La sekretario estos S-ro J. Soyeur, la tiel aktiva sekretario de Belga Ligo ; dum S-ino J. Plyson, kasistino de la Ligo, ankaŭ funkcios kiel kasistino de la Kongreso.

Kiel membroj jam havas lokon en la Komitato : S-roj J. Hérion, malnova samideano kaj prezidanto de la Grupo de Verviers ; S-ro M. Guyot, F. D. de UEA, en Barchon kaj S-ro J. Koeune, el Verviers ; dum eventuale aliaj lokaj samideanoj estos poste alelektataj.

La grandaj linioj de la Kongresa Programo jam estas pristudataj : Ili aspektas, ĝenerale, iom similaj al tiuj de ĉiu pentekosta kongreso kaj ni presigos la provizoran programon, en sekvonta numero de nia revuo.

Sed la membroj de Belga Ligo, kiuj ne jam enskribiĝis sin en la Honoran Kolonon por la Kongreso de 1954, povas ensendi sian kotizon de Fr. 50 al la poŝtĉekkonto N° 37.66.98 de Belga Esperanto-Kongreso, Jourdanstrato, 185 Bruselo.

---

Centra Oficejo de U.E.A. estos petata forigi, en la nova eldono de la Jarlibro, la literojn (B) kaj (F) por la delegitoj de la urb(et)oj : Ceroux-Mousty, Dendermonde, Kortrijk, Leuven, Liége, kaj Ottignies, kie tamen estas nur unu delegito.

5. *Kunvenoj* :Unuanime la delegitoj decidas okazigi kunvenojn de B.C.K.E. minimume unufoje ĉiujn tri monatojn. La Prezidanto fiksos ĉiufoje la konvenan daton.

---

## PENSO MEDITOTA

Se la kritiko estas prava kaj plena je ĝentileco, vi ŝuldas al ĝi dankojn kaj cedemon ;

Se ĝi estas prava sen ĝentileco, cedemon sen dankoj ;

Se ĝi estas insultega kaj malprava, silenton kaj forgeson.

D'ALEMBERT (1717-1783).

(Franca filozofo, unu el la fondintoj de la « Encyclopédie ».)



# La 39a Universala Kongreso

**Haarlem : 31an de julio - 7an de augusto 1954a**

*(Poŝtfako 140, Haarlem, Nederlando).*

OFICIALA KOMUNIKO N-ro 2.

*Fakaj asocioj* : Organizitaj kaj agnoskitaj fakaj asocioj, kiuj intencas okazigi fakan kunsidon dum la kongreso, bonvolu kiel eble plej baldaŭ anonci sin ĉe la L.K.K. kaj sciigi siajn dezirojn.

*Karavanoj* : Personoj kaj instancoj, kiuj organizos karavanojn al la kongreso en Haarlem, bonvolu sin anonci al la L.K.K.

*Limigo de partopreno* : Tial ke la kongresa urbo estas turisma centro kaj ankaŭ sekve de la fakto, ke la enteneblo de salonoj estas limigita, la partopreno en la kongreso estas limigita je ĉ. 2000 personoj. La nombro de enlandanoj estas limigita je 750. Sekve frua aliĝo estas konsilinda. Post atingo de la cititaj ciferoj la L.K.K. malakceptos pluajn aliĝojn, kaj certe post la 30-a de junio 1954. Ne supozu, ke aperos « tagaj kartoj » en la nuna kongreso !

*Postkongreso* : Krom la kutimaj postkongresaj ekskursoj, okazos oficiala Postkongreso 4-taga en Leeuwarden, norda Nederlando. Detaloj sekvos.

*Statistiko* : *(ĝis 31 okt.)* : Aŭstrio 1, Belgujo 5, Brazilo 3, Britujo 49, Danujo 3, Finnlando 6, Francujo 11, Germanujo 14, Hispanujo 5, Italujo 5, Japanujo 1, Jugoslavio 22, Kanado 2, Kostariko 1, Nederlando 138, Norvegujo 4, Novzelando 1, Svedujo 23, Svislando 11, Usono 4. Sumo 307 el 20 landoj. *(Noto de la Red.* : nunmomente jam pli al 500).

* * *

*ANTAŬKONGRESO* : Aldone al tiu ĉi oficiala komuniko, ni povas informi ke, laŭ ĵusricevitaj sciigoj, okazos en Antverpeno, de la merkredo, 28a ĝis la vendredo, 30a de julio, antaŭkongreso, al kiu estas invitataj partopreni ĉiuj kongresanoj, kiuj survoje trairas Belgujon kaj do povas halti en Antverpeno.

Dum tiu ĉi antaŭkongreso okazos diversaj prelegoj de eminentaj esperantistoj kaj vizitoj kaj ekskursoj en kaj ĉirkaŭ la Skeldo-urbo.

La kotizo por tiu antaŭkongreso estas Fr. 50 kiuj povas esti, de nun, pagataj al la P.C.K. 10.06.30 Esperanto-Kongreso, Deurne-Antverpeno.

---

## PREMIO POR MEMBROJ-KOMERCISTOJ

**kaj por tiuj kiuj rilatas kun klientaro.**

**En la antaŭa numero de nia revuo, la Grupo « La Verda Stelo » anoncis ke ĝi intencas presigi anoncon, en kiu ĝi rekomendos siajn membrojn, komercistojn aŭ profesiulojn kiujn ajn, kiuj rilatas kun klientaro.**

**Tio estas por tiuj membroj senpaga reklamo.**

**Ankaŭ la Brusela Grupo decidis agi same !**

**Ni do, ekde la monato de januaro, presigos la ricevitajn kaj ricevotajn listetojn, en kiu ĉiu membro rajtas je unu-linia teksto, kiun li do eventuale havigu TUJ, ĉar la januara numero, aperos tre baldaŭ post tiu ĉi de decembro.**

**Ni alkutimiĝos efektive, en 1954a, al aperigo de la revuo en la komenco de ĉiu monato.**

---

## MENDU POR VIA PROPAGANDO !

CED/5 estas la Dokumento n° 5 de la Centro de Esploro kaj Dokumentado. Originale kompilita en Esperanto, de Prof. D-ro Lapenna, okaze de la sepa kunsido de UNESKO, sub la titolo : « Raporto pri la internacia lingvo Esperanto », tiu dokumento tradukita nacilingven, prezentas konvenan kaj efikan propagandilon. Ĝi aperis interalie en nederlanda kaj franca, lingvoj presita sur 4 paĝa 4° formato. Bonvolu mendi ĉe : BELGA ESPERANTO-INSTITUTO, Oostenstr. 26, Antwerpen. Pĉk. n° 1680.58.

La dokumento estas havebla :

Nederlandlingve : Fr. 7,50 por 5 ekzempleroj.

Franclingve : Fr. 6, por 5 ekzempleroj (afranko enkalkulita).

# Paŝo post Paŝo en Esperanto 10.

*Tiun ĉi fojon ni iomete volas paroli pri la organizo de la Esperanto-movado, pri ĝiaj diversaj « eroj » kaj doni kelkajn simbolajn mallongigojn, kiajn oni ofte trovas en la Esperanto-revuoj*

La bazo de la esperantista vivo estas la loka grupo. En miloj da urboj kaj urbetoj ekzistas grupoj : ĉu malgrandaj amikaj rondoj, kiuj nur de tempo al tempo kunvenas en la domo de unu el la anoj, ĉu oficiale ekzistantaj societoj kiel la Brusela aŭ la Bruĝa Grupoj de nia Ligo, kaj kiel «La Verda Stelo » de Antverpeno, kiu estas laŭleĝa societo sen profita celo (S.c.p.C.).

Tiuj diversaj grupoj aliĝas ĝenerale al landa asocio, al nacia ligo.

R.B.L.E., kiu ankaŭ estas laŭleĝa societo, havas administrantaron kiu konsistas el reprezentantoj de la diversaj aliĝintaj lokaj grupoj.

Aŭstria Esperantista Federacio (A.E.F.), Argentina Esperanto-Ligo (A.E.L.), Brita Esperantista Asocio (B.E.A.), Brazila Esperanto-Ligo (B.E.L.), Germana Esperanto-Asocio (G.E.A.), Hispana Esperanto-Federacio (H.E.F.), Unuiĝo Esperantista Franca (U.E.F.), Svisa Esperanto-Societo (S.E.S.), Sveda Esperanto-Federacio (S.E.F.), Nederlanda Esperanto-Asocio « La Estonto Estas Nia » (L.E.E.N.), k.t.p.

En kelkaj landoj, ekzistas pli ol unu ĝenerala ligo. Ekzemple en Belgujo, flanke de R.B.L.E., ekzistas ankaŭ Flandra Ligo Esperantista (Fl. L.E.).

Antaŭ kelkaj semajnoj, fondiĝis nova instanco en nia lando, por atingi pli regulan, pli harmonian kunlaboradon inter R.B.L.E. kaj Fl. L.E. : la « Belga Centra Komitato Esperantista » (B.C.K.E.).

Ĉiuj tiuj naciaj organizaĵoj aliĝas al tutmonda ligo : Universala Esperanto-Asocio (U.E.A.). Tiamaniere, ĉiu kiu aliĝas al simpla loka grupo, aŭtomate iĝas membro de la nacia ligo de sia lando kaj ankaŭ de la forta internacia movado, tiu granda kaj grava organizaĵo, kiu daŭre penadas por impona reprezentado de nia movado, ĉie kie tio povas utili.

Kiel vi verŝajne jam scias, U.E.A. eldonas valoran jarlibron, belan revuon kaj interesajn librojn. Estas U.E.A. kiu disponas pri sia delegita reto kaj faris tiom da servoj al miloj da esperantistoj.

Jen pri la neŭtrala esperanto-movado ; t.e. (tio estas) la organizo al kiu ĉiu povas aliĝi sen iu ajn konsidero pri raso, religio aŭ politika konvinko.

Flanke de tiu neŭtrala movado, ankaŭ ekzistas laborista movado, same kiel la neŭtrala kun landaj ligoj kaj internacia organizo.

En nia lando ekzemple laboras la F.L.E. (Federacio de laboristaj Esperantistoj en la Regiono de la Nederlanda Lingvo). La internacio estas S.A.T. (Sennacieca Asocio Tutmonda). Ĝi ankaŭ eldonas jarlibron, revuon kaj librojn.

Sed la Esperantistoj ankaŭ fieras pri siaj diversaj fakaj societoj, kiujn ili havas kaj el kiuj ni citas kelkajn :

Internacia Asocio de Poŝtmarkkolektantoj (I.A.P.K.), Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista (I.K.U.E.), Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (I.L.E.I.), Internacia Scienca Asocio Esperantista (I.S.A.E.), Kristana Esperantista Ligo Internacia (K.E.L.I.), Skolta Esperantista Ligo (S.E.L.), Tutmonda Esperantista Kuracista Asocio (T.E.K.A.), Tutmonda Esperantista Ĵurnalista Asocio (T.E.J.A.) k.t.p.

Kaj ĉu vi ankaŭ — post tiuj malmaltaj detaloj — opinias, ke Esperanto estas nur fuŝprovaĵo en kiu oni ne povas sin esprimi, kaj kiu neniam havos sukceson ?

H. S.



# BELGA KRONIKO

**ĜOJAN KRISTNASKFESTON**
deziras al ĉiuj
Reĝa Belga Ligo Esperantista
kaj
Belga Esperantisto.

ANTVERPENO

**Esperanto-Grupo « La Verda Stelo »**

*Poŝtĉeknumero* : 726.54.

La 2an de oktobro okazis la parolata ĵurnalo, laŭ nova koncepto de la prezidanto, t.e. kun konstantaj rubrikoj al kiuj kunlaboros do «regulaj » redaktoroj, inter aliaj : F-ino H. Hofkens (Histoire de Esperanto); F-ino M. Hofkens (Diversaĵoj) ; F-ino M. Ameryckx (La Angulo de la Virino), S-ino R. Lecat (Geedzaj Problemoj : S-ro G. Debacker (Sciindaĵoj) ; S-ro H. Vermuyten (La Kritikemulo) ; S-ro A. Verhoeven (La Forgesemulo), dum aldoniĝos plia rubriko « Kiel mi esperantiĝis », en kiu ĉiumonate alia membro funkcios, sed kiun enkondukis S-ro R. Van Eynde. Krome la libervolaj kunlaborantoj havis kaj havos ĉiam la okazon aŭdigi siajn tekstojn.

La 9an : S-ro Maur. Jaumotte, jusreveninta de vojaĝo en Anglujo, donis siajn « Vojaĝimpresojn pri Londono » kaj ekuzis, unuafoje, la specialan lumbildaparaton, aĉetitan de la Grupo kaj kiu permesas montri ĉiujn dokumentojn el libroj, broŝuroj, k.t.p. La agrabla kaj kapabla maniero laŭ kiu la prezidanto rakontis siajn travivaĵojn, kune kun la projekcio sur la ekrano, igis tiun vesperon unu el la plej ĝuindaj de la jaro kaj S-ro De Ketelaere estis ĉies interpretanto, kiam li varme dankis la paroladiston.

La 17an, F-ino Henny De Ketelaere sukcesis amuzigi ĉiujn dum pli ol plena horo. Ŝiaj diversaj numeroj estis akceptataj kaj plenumataj de entuziasmaj aŭskultantoj, kiuj vigle partoprenis. Iĝis vere gaja vespero.

· La 24an : Mitulvespermanĝo ! en restoracio « Métropole », Handschoenmarkt. Bonhumoro kaj gajeco ; deklamaĵoj kaj komuna kantado, dum kiu S-ro K. Ameryckx agrabligis la bonege sukcesintan vesperon.

Dum la lasta kunsido de la monato, nova provo : TEATRA ELSENDAJO », elektivigita per la elektra gramofono de la grupo kaj la ĵusaĉetita mikrofono, kiuj ebligas la prezentadon, sen parkera lernado, de teatraĵeto el apuda « studio-saloneto », kun nur la laŭtparolilo en la kunvencjo. Estis tiel prezentata « Kia Miksaĵo » de F. Van Doren kaj la geaktoroj estis : F-inoj Cl. Peeters kaj H. Hofkens, S-roj K. Ameryckx, Roger Jaumotte, J. Montmirail (kiu zorgis pri la tehnika prezentado kaj samtempe estis la ĉion klariganta voĉo), P. Peelman kaj J. Verstraeten... Grandega sukceso por ĉiuj... kaj speciale por la... provo daŭrigota !

La 6an de novembro, alvokitaj per la speciale dissendita kaj bele presita fald-programeto, la membroj ankoraŭ pli multnombraj ĉeestis la parolatan ĵurnalon, dum kiu la prezidanto, — plena je planoj kaj projektoj dum la lasta tempo — mem realigis, helpe de la lumbildaparato, iun « filma ĵurnalo », en kiu mankis nenio, eĉ ne la gastronomia kaj la humora rubrikoj ! Nova provo ! Novaj perspektivoj !

La 15an, S-ro R. Van Eynde paroladis pri « Sociaj Problemoj » kaj pro sia profesio bone konanta la temon, li vere plej altgrade interesigis la publikon, kiu faris multajn postdemandojn, kiuj pruvis la plenan sukceson kaj por kiu la prezidanto varme dankis, post kiam li ankaŭ estis kore rebonveniginta S-inon De Naeyer, kiu forrestis dum kelkaj semajnoj pro iom grava operacio.

La 20an, F-ino De Winter montris unue kaj praktike kiel drapi ŝtofojn kaj ŝia demonstracio vekis la atenton de la sinjoroj, almenaŭ samgrade kiel tiun de la sinjorinoj. Poste F-ino Toussaint parolis pri sia libertempo ĉe la Lazura Marbordo kaj la montrado de belaj vidaĵoj sur la ekrano ankoraŭ plivalorigis la interesajn detalojn donitajn de ŝi. Varma aplaŭdo kaj laŭdvortoj de la prezidanto rekompencis ambaŭ membrinojn.

*Programo de la sekvontaj monatoj :*

*Decembro* (memorigo) : la 18an : Zamenhofvespero kun prezentado de « La Frago » kaj de « La Turo de Babelo », du speciale skribitaj teatraj elsendaĵoj de anonimulo kaj de la prezidanto (Komenchoro : la 20an) :

la 26an (*sabate je la 20a horo*) : Kristnaskfesto kaj Balo. (*Ĉiu alportu donaceton.*)

*Januaro* : la 8an : Parolata ĵurnalo ; lundon, la 11an, je la 20a, en la lernejo Belgiëlei, 99 : ELEMENTA KURSO, gvidota de S-ro M. Jaumotte ; la 15an : Ĝenerala Jarkunsido ; dimanĉon, la 17an : Jara Festeno, je la 17a horo en restoracio « Bristol », Frankrijklei, 19 (Prezo : Fr. 100 sen servmono ; Fr. 110, servmono enkalkulita) ; la 22an : Parolado de S-ro Fr. Van Doren : « Impresoj el Ameriko » ; la 29an : Kabareda Vespero.

*Februaro* : la 5an : parolata ĵurnalo ; la 12an : prezentado de filmo, fare de S-ro R. Van Eynde ; la 19an : Amuza vespero ; la 26an : teatra elsendaĵo ; la 28an (dimanĉe) : Karnavala Balo.

*Gratuloj.*

Al nia malnova amiko S-ro Hector Vermuyten, kiu estis festata pro sia 35jara jubileo ĉe la Urba Administracio, kiel sektorestro de la urbpurigada fako.

Ni aldonu al niaj gratuloj specialan dankmencion pro la fakto ke S-ro Vermuyten, kiu ankaŭ estas la redaktoro de la revuo « Kringleven O.R.D. » de la oficistaro de tiu administracio, kaptas ĉiujn okazojn por, per artikoloj, tradukoj, k.c., atentigi siajn kolegojn kaj subrangulojn pri nia lingvo.

## BRUGO

### Bruĝa Grupo Esperantista.

*(Poŝtĉeknumero : 4835.33).*

La 25an de septembro komencîgis nova elementa kurso kun 14 gelernantoj kaj sub gvidado de la prezidanto S-ro Ch. Poupeye. La lecionoj estas donataj dum la unua horo de ĉiu kunveno kaj dum la dua horo la novaj gelernantoj partoprenas la grupan kunsidon. Tiuj unuaj kunsidoj estis plejparte agrabligataj per simpla kaj paroliga portretludado. La 14an de oktobro, estis aŭdigataj artaj diskoj kun verkoj de Tsjaikovski kaj Beethoven. La unua grupa balo de tiu ĉi vintra sezono, okazis la 17an en la dancejo « Tabarin ». Ĝi estis, kiel kutime, tre granda sukceso je ĉiuj vidpunktoj, la multaj ĉeestantoj nur kontraŭvole foriris je la 5a, firme promesante reveni al la dua grupa balo komence de 1954a.

Raportado pri tiu dancfesto plenigis la kunvenon de la 21a. Dum la kunveno de la 27a, S-ro J. Vermeersch, fidela membro, adiaŭis la grupon, por soldatiĝi en Lieĝo.

F-ino Yvette Deboo, lernantino de la antaŭa kurso, faris la 3an de novembro interesan paroladon pri sia « Vojaĝo al Tirolo », ĉion klarigante per agrabla voĉo kaj belaj fotografaĵoj.

La 8an, delegacio de la membraro partoprenis kun la grupa flago en la ĉiujara funebra sekvantaro ĝis la milita tombejo.

Humoraĵoj estis prezentataj la 10an, interalie de la pli junaj gemembroj F-inoj De Staercke, Seye kaj Michotte kaj S-ro Marcel Poupeye. Lernado kaj unua kunkantado de « La Espero » okazis la 17an.

Nova numero de la « Parolata gazeto » aperis la 24an kun kontribuoj de F-ino De Staercke pri « Dani Kay », S-ro Bouquet « Humoraĵoj » kaj S-ro Marcel Poupeye pri « La Erupcio de la Vesuvo ». Dum muzika vespero de la 1-a de Decembro estis disaŭdigataj diversaj fantaziaj diskoj, kiuj amuzigis la ĉeestantojn kaj nereziste̱ble dancigis la plej junajn el ili.

*Programo de la venontaj kunsidoj* :

Ordinara kunveno : ĉiumarde je la 20a, en la sidejo « Gouden Hoorn - Cornet d'Or » Simon Stevinplaats, 2.

La unua horo de ĉiu kunveno estos dediĉata al leciono : dum Januaro kaj la 2an de Februaro de *perfektiga kurso* kaj ek de la 9a de Februaro de nova elementa kurso. La ĉi suba programo rilatas do nur al la dua horo de ĉiu kunveno :

*Januaro* : 5an : Portretludado ; 12an : Ĝenerala jarkunsido de la grupo : raportoj kaj elekto de la komitato por 1954 ; 19an : Kartludado ; 26an : Parolata gazeto.

Eksterprograme : Sabaton 30an de Januaro, je la 21-a en la dancejo TABARIN : dua *vintra balo* de la grupo kun la bonega orkestro « The Moonliners ».

*Februaro* : 2an : Muzika vespero ; 9an : NOVA ELEMENTA KURSO, la membroj propagandu de nun kaj varbu ĉiu almenaŭ unu novan lernanton. Post la leciono interkonatiĝo kun la novaj lernantoj ; 16an : Portretludado ; 23an : Parolata gazeto.

*Marto* : 2an : (Karnavalo) Ekskurso al la marbordo por karnavalaj festoj ; 9an :



Kanta vespero ; 16an : Kartludado ; 23an : Humoraĵoj ; 30an : Surpriza vespero : ĉiu alportu nekonatan premion.

## BRUSELO

### Esperantista Brusela Grupo.

*(Poŝtĉeknumero : 12.30.48)*

Niaj kunvenoj, ĉiam multvizitataj, okazis laŭ la antaŭviditaj programoj.

La 14an de septembro S-ro Van Geit regalis nin per sia prelego pri : Munkeno kaj ĝia kongreso. Li rikoltis multe da sukceso por sia gaja, humorplena rakontmaniero. La 21an estis la vico al S-ino Daems, kiu pritraktis « La Virina Angulo », kiu cetere ankaŭ trovis interesiĝon ĉe la viroj. Dimanĉon la 27an, je la 15a horo okazis la dua vizito al la ĝardenkultura lernejo sub la gvidado de nia tre sindonema samideano Van Geit. La interesa vizito finiĝis en la konservejo de la fruktoj, kie ni povis manĝi la belajn kaj bongustajn pirojn kaj pomojn, kiuj estis kulturataj en la ĝardeno. La kunveno de la 28a estis anstataŭata per « mitulvespero ». Multnombre la samideanoj partoprenis kaj pasigis la vesperon en familia kunesto kun bongustaj mituloj. La 5an de oktobro estis eksterordinara kunveno, nome la disdono de la premioj al la laŭreatoj de la parolata gazeto kaj al la plej regula ĉeestanto de la kunsidoj. La laŭreatoj estis S-ino Ernst kaj S-ro Castel por la parolata gazeto kaj F-ino Kestens por la plej regula ĉeestado. La agrabla vespero finiĝis per vendado, profite de la grupkaso de belaj fruktoj, kiujn donacis la direktoro de la ĝardenkultura lernejo al la grupo. La 12a estis dediĉita al muziko. S-ino Stern prelegis pri « Tri Muzikistoj, tri Epokoj », kaj ilustris sian prelegon per disaŭdigo de muziko de Johann Sebastian Bach, Felix Mendelsohn-Bartholdi kaj Claude Debussy. S-ino Stern rikoltis multe da sukceso. La 19an S-ro Vander Stempel donis la unuan lecionon de la perfektiga kurso. Li pritraktis laŭ sia lerta maniero la vortsimilecon. La 26an parolis S-ino Lefèbvre pri sia vojaĝo al Jugoslavujo. Ŝi donis multajn geografiajn kaj historiajn detalojn pri tiu lando kaj sukcesis en tre interesa maniero respondi al pluraj demandoj flanke de la gesamideanoj.

La 2an de novembro okazis la parolata gazeto ; gajninto de tiu vespero estis S-ro Castel. Dimanĉon la 8an la geanoj de la Brusela Grupo vizitis la ekspozicion « Bruselo dum la XV-a jarcento », organizitan de la urbestraro en Broodhuis (Granda Placo). Feino, sub la formo de ĉarma kaj lerta gvidantino, image transportis la vizitantojn mezen de la malnova Bruselo, bilde rekreita per la sugesta genio de artoservistoj. Bela sonĝo, kiu dolĉe estingiĝis en melodiaj kantatoj de la horo de la Burgunda kapelo, la samaj, kiujn aŭskultis niaj prapatroj, kiam la dukoj de Burgundujo estis regantoj niajn provincojn. La 9an, S-ro Van Geit interesigis nin per tre bela prelego : « Pri insektoj » (dua parto). Li sukcesis, pere de bildoj, klarigi al la gesamideanoj la vivociklon de la koleopteroj. Kun interesiĝo la tria parto de tiu prelego estas atendata. La 16an, S-ro Vander Stempel gvidis la perfektigan kurson dum kiu li paroligis la gesamideanojn, kiuj devis uzi la vortojn, pri kiuj S-ro Vander Stempel la antaŭan fojon parolis.

*Programoj por la estontaj kunsidoj* :

*Decembro* : La 14an : Zamenhofa vespero en nia kunvenejo ; la 21an : S-ro Van der Stempel gvidos la perfektigan kurson ; la 28an : Kristnaskfesto en la kunvenejo. Pro la granda sukceso de la pasintjara kristnaskfesto, ni intencas denove ornami arbon kaj disdoni donacojn.

*Januaro* : La 4an : Parolata gazeto ; la 11an : S-ro Van Geit parolos pri «Munkeno» (dua parto) ; la 18an : S-ro Van der Stempel gvidos la perfektigan kurson ; la 25an : ĝenerala kunveno.

*Februaro* : La 1an : Parolata gazeto ; la 8an : S-ino Daems parolos pri « Virina Rubriko » (dua parto) ; la 15an : S-ro Van der Stempel gvidos la perfektigan kurson ; la 22an : S-ino Lefèbvre respondos al demandoj pri Jugoslavujo (dua parto).

* * *

« Kion oni povas esperi koncerne Esperanton », estis la titolo de interesa artikolo, kiun nia juna samideano J. M. Hendrickx redaktis en franca lingvo. La artikolo aperis en « Le Cercle », bulteno de la junaj lernantoj de l'Ateneo kaj de la komerca lernejo Leon Lepage. S-ro Hendrickx pritraktis en sia artikolo la esperon de la Esperantistoj, ke eble jam dum la ĝenerala kunveno en Mon-

# Nia gazetara servo

(Redaktoro : Michel PILLOY, p/a « ESPERANTO », 18, rue de Franquenies, Ottignies-Brabanto).

*Dissendo de informoj al la gazetaro.*

Dum la monatoj Aŭgusto-Oktobro, 13 artikoloj estis senditaj al 70 gazetoj, inter kiuj 41 franclingvaj, 23 flandraj kaj 6 luksemburgaj. Krome tiuj artikoloj estis senditaj ankaŭ al la parolata ĵurnalo de la franclingva radio R.N.B. kaj de la flandra B.N.R.O., al redaktoro de la tutmonda mallongonda radioservo, kaj — dokumentacele — al la Direkcio de la Servo pri Popol-Edukado de la Ministerio pri Publika Instruado.

*Alvoko al ĉiuj membroj.*

Por ke ni povu juĝi pri la efiko de nia Gazetara Servo, kaj kompili kiel eble plej kompletajn statistikojn, estas *absolute necese* ke ĉiu membro kunlaboru per kolektado de ĉiuj artikoloj, informoj, anoncoj aperintaj pri Esperanto.

Bonvolu eltondi el viaj gazetoj ĉion, kio rilatas al Esperanto : zorge noti sur la eltondaĵo la nomon de la ĵurnalo kaj la daton de la apero (ĉi-tiuj sciigoj estas nepre necesaj). Bonvolu havigi tiujn eltondaĵojn, ĉu rekte al nia Gazetara Servo, ĉu al unu el niaj lokaj korespondantoj.

Tiuj eltondaĵoj povas esti sendataj kiel presaĵoj, kun poŝtmarko je 0.20 Fr., kondiĉe ke la koverto estu ne-fermata.

Jam antaŭe ni kore dankas vin pro via kunlaboro.

---

tevideo en 1954. UNESKO decidos oficiale adopti Esperanton, kiu decido, se ĝi veriĝus, havus gravajn sekvojn por la uzado de tiu lingvo ĝenerale.

* * *

**Pro la fakto ke la estontaj numeroj de la revuo aperos, en kunlaboro kun aliaj Ligoj, ni petas la Grupojn, ke ili sendigu al nia adreso la raportojn kaj programojn kaj ĉiujn enpresotaĵojn por « Belga Esperantisto » prefere ANTAŬ, sed NENIAM POST la 15a de la monato !**

*Lokaj korespondantoj.*

Antverpeno : A. Verhoeven, 37, Pieter Genardstraat, Antwerpen.

Bruĝo : Ch. Poupeye, 32, Elf Julistraat, Brugge.

Bruselo : R. Bribay, c/o R.B.L.E., 106, rue Général Lotz, Uccle.

Verviers : S-ino Marg. Mention, 58, rue de Büttgenbach, Ensival.

*Speciala Mencio.*

Ni deziras speciale mencii, kiel unu el la gazetoj, kiuj plej fidele kaj afable subtenas nian movadon, la tre popularan ĉiusemajnan ilustritan revuon « Le Moustique », kiu jam de pluraj jaroj rezervas specialan lokon en sia rubriko « Radio-TV-Moustique » al la kalendaro de la Esperanto-elsendoj.

Nur en 1953 tiu Esperanto-kroniko jam aperis 19-foje, tio signifas : eldonkvanto de proksimume 2.750.000 ekzempleroj !!!

Se vi deziras informojn pri Esperanto-elsendoj, senhezite skribu al :« Le Moustique », Esperanto-kroniko, 41, rue Destrée, Marcinelle.

Ĝia redaktoro tre certe ĝojos helpi vin.

---

## Radio

(Redaktoro : Michel PILLOY, c/o « ESPERANTO », 18, rue de Franquenies, Ottignies-Brabant).

*Radio-Roma.*

Ŝanĝis la horon de siaj Esperanto-elsendoj. Ili nuntempe okazas ĉiumerkrede kaj-vendrede, de la 18.50 h. ĝis la 19.10 h., per mallongondaj frekvencoj : 31,33 m. kaj 49.02 m. (9.570 kaj 6.010 kilocikloj).

Por decembro, oni ankoraŭ anoncas :

Vendredon, la 11an : Zamenhof (okaze de la 94a datreveno de lia naskiĝtago) ;

Merkredon, la 16an : Esperanto en la praktiko ;

Vendredon, la 18an : Respondoj al la geaŭskultantoj kaj bibliografio ;

Merkredon, la 23an : La Sankta Kripo ;

Vendredon, la 25an : La Kristnasko :

Merkredon, la 30an : La fablo-verkisto Trilussa.

Parolantoj : merkrede : Luigi Minnaja ; vendrede ; Prof. Vincenzo Musella, Direk-



# Humoraĵoj

**Decidiga Kialo.**

La ministro, al sia filo :

— Ĉu vi fine sukcesis la ekzamenon, Peĉjo ?

— Jes, paĉjo.

— Kaj kion oni demandis al vi ?

— Ĉu mi estas filo de vi.

**En la « Far-West ».**

La sunbrunigita « cow boy » eniras pezpiede la drinkejon, kaj malfermante laceme la pro soifo sekiĝintajn lipojn, ordonas al la mastro, ke li donu al lia ĉevalo sitelon de la plej bona viskio, kiun li posedas.

— Kaj vi, kion vi trinkos, amiko ? demandas la mastro.

— Nenion, respondas la polvokovrita « cow boy », mi devas konduki.

**Al ĉiu la siaĵo.**

Foje notario luis fiakron, por iri al vilaĝo en la ĉirkaŭaĵo de Sevilla, kaj la veturigisto postulis de li dekkvar pesetojn. Opiniante la prezon tre alta, la notario diris : « Ĉu vi estas preta ĵuri, ke tio estas la prezo, kiun oni kutime pagas por tiu vojaĝo.». « Jes, certe, sinjoro, respondis la veturigisto.

Tiam la notario tiris el sia poŝo eburan kriston, kaj prezentante ĝin al la veturigisto, ĵurigis lin. Poste li nur donis al li ses pesetojn, dirante ke, laŭ la leĝo, li konservis la ceteron por la kostoj de la ĵureldiro.

**Kompleta sukceso.**

Dudeko da pasaĝeroj de la granda transatlantika ŝipo vizitas dezertan insulon. Ne tiel dezerta cetere ĝi estas, kiel oni supozis. Ĉar la vizitantoj renkontas iun, ne indiĝenon, sed blankhaŭtulon kiel vi kaj mi.

Protokolo de la intervjuo :

Horo de la turistoj. — Ĉu vi vere vivas tie ĉi ?

La solulo. — Jes.

La horo... — Tute sola ?

La solulo. — Jes.

La horo... — Jam de longe ?

La solulo. — Ho ! Jes.

La horo... — Kaj kial ?

La solulo. — Por forgesi.

La horo... — Por forgesi kion ?

La solulo. — Mi forgesis.

**Tiuj infanoj !**

— S-ro Ludoviko, ĉu vi scias, kiu inventis la pulvon ?

— Kial vi demandas tion ?

— Ĉar patro ĉiam diras ke nè estas vi.

**Profesia malsano.**

Paciento. — Doloras al mi la ventro, Doktoro.

Doktoro. — Senvestiĝu.

Mi vidas. Via umbiliko moviĝis du centimetrojn malsupren. Kiu estas via profesio ?

Paciento. — Standardportisto.

**Kompreneble !**

Kamparano eniris la butikon de optikisto por aĉeti okulvitrojn.

Li surmetis paron post paro ĉiam dirante, ke li ne kapablis legi per ili la

---

toro de la Esperanto-sekcio : A. Blasimme.

Adreso : Radio-Roma, Esperanto-sekcio, 56, Via Vittorio Veneto, Roma, Italujo.

*Urugvajo.*

Esperanto-elsendoj nun okazas ankaŭ en Urugvajo, per stacioj : CX26 de la Ministerio por Agrikulturo, CX50 Radio La Capital kaj CX14-CXA19 Radio El Espectador.

Kun Brazilo kaj Gvatemalo, Urugvajo estas la tria lando en Latin-Ameriko, kiu uzas Esperanton por siaj radio-elsendoj.

* * *

*Kompleta Kalendaro pri la Esperanto-elsendoj.*

Regule aperas en la ilustrita ĉiusemajna revuo « Le Moustique », kies Esperanto-redaktoro ankaŭ respondas al ĉiuj demandoj pri Esperanto-elsendoj.

Viajn korespondaĵojn adresu al : « Le Moustique », Esperanto-kroniko, 41, rue Destrée, Marcinelle.

## ZAMENHOF-TAGO - LIBRO-TAGO

VERKOJ (originalaj aŭ tradukitaj) de L. L. ZAMENHOF

| | |
|---|---|
| *Fundamento de Esperanto* (franca) ... fr. | 10.— |
| *Fundamento de Esperanto* (nederlanda) ... | 10.— |
| *Fundamenta Krestomatio* ... (bind 100.— broŝ. | 80.— |
| *Fabeloj de Andersen* (vol. IIIa) ... | 36.— |
| *Georgo Dandin* (Molière) ... | 17.— |
| *Ifigenio en Taŭrido* (Goethe) ... | 30.— |
| *La Rabeno de Baharah* (Heine) ... | 22.— |
| *La Revizoro* (Gogol) ... | 30.— |
| *Levidoj* (el la Biblio) ... | 22.— |
| *La Predikanto* (el la Biblio) ... | 13.— |
| *La Sankta Biblio en Esperanto* ... | 90.— |
| *Originala Verkaro* (kompilis Dietterle) lukse bind. ... | 160.— |
| *Leteroj de L.L. Zamenhof* (du vol.) ... | 260.— |
| *La Batalo de l'Vivo* (Ch. Dickens) ... | 30.— |
| *El la Biblio* ... | 4.— |
| *El Dramoj* (fragmentoj) ... | 4.— |
| *El Komedioj* (fragmentoj) ... | 4.— |
| *Vivo de Zamenhof* (ilustrita) (E. Privat) ... | 38,50 |
| *Historio de la Lingvo Esperanto* (E. Privat) I 1887-1900 ... | 24.— |
| » » » » II 1900-1927 ... | 44.— |
| *Gvidilo tra la Esperanto-Movado* (G. P. de Bruin) ... | 14.— |
| *Esperanto 60-jara - Skizo pri la evoluo de la lingvo literatura* (G. J. Degenkamp) broŝ 20.— kart. | 26.— |
| *La Esperanto-Movado - Ĝia historio, organizo kaj nuna Stato* (sept. 1946) (Stöp-Bowitz & Isbrücker) ... | 25.— |

Mendu ĉe : **BELGA ESPERANTO-INSTITUTO**

Koopera Societo. **26. Oostenstraat - Antwerpen.** Poŝtĉekkonto 1689.58

Jurnalon, kiun li tenis en la mano.

« — Sed, ĉu vi scias legi ? », demandis la optikisto.

« — Se mi scius legi, ĉu mi devus aĉeti okulvitrojn ? »

**Ni distingu.**

Efraïn, maljuna negro, promenadas fierege, kun kolumo senmakula kaj sia plej bela jako.

— Ĉu vi ne laboras hodiaŭ ? demandas al li konatulo.

— Certe ne. Mi solenas mian oran edziĝ-jubileon.

— Gratulojn. Sed kial ne estas kun vi la edzino ?

— Mia nuna edzino ! respondas Efraïn kun digno, ŝi ne estas koncernata : ŝi estas la kvara.

**Oni estu singardema.**

Scenejo : dezerta stratangulo, je noktomezo.

Unua pasanto. — Pardonu, sinjoro. Ĉu ekzistas policejo en la ĉirkaŭajo ?

Dua pasanto. — Ne Sinjoro, ne estas.

Unua pasanto. — Kie do mi povus trovi policiston ?

Dua pasanto. — Mi ne scias, Sinjoro, ĉar ili estas maloftaj en la kvartalo.

Unua pasanto. — Ĉu vi vidis neniun proksime de tie ĉi ?

Dua pasanto. — Ne, Sinjoro.

Unua pasanto. — Perfekte. Vi do bonvolu doni al mi vian poŝhorloĝon kaj vian monujon.


LES ENTREPRISES

**DERKS**

226, Rogierstrato, BRUSELO

Tel. : 15.19.92

Entrepreno de

KONSTRUAĴOJ

Por viaj esperantaĵoj, libroj, insignoj k. c.

**Belga Esperanto-Instituto**

26, Oostenstraat, 26

ANTVERPENO

*kiu ankaŭ havigos al vi nacilingvajn librojn, revuojn kaj gazetojn, kaj ĉiuspecan skribmaterialon.*

BRUGGE BRUGES

**Hôtel du Cornet d'Or**

2, Simon Stevinplaats, 2

**Centra situo - Moderaj prezoj**

—— **Moderna komforto** ——

Sidejo de « Bruĝa Grupo Esperantista »

—— Tel. 314.59 ——

**G. FAES**

16, Schoenmarkt, 16

ANTVERPENO

—— **Por via MUZIKO,**

**RADIO kaj GRAMOFONO**

**BELGA ESPERANTO-INSTITUTO, koopera societo.**

26, Oostenstraat, Antverpeno.

Rekomendas al vi :

D-ro IVO LAPENNA :

**Aktualaj problemoj de la nuntempa internacia vivo :**

Fundamentaj nocioj; lukto por la paco per juraj rimedoj; internaciaj organizajoj. — Prezo : 70 fr.

Ankaŭ ĉiujn aliajn Esperanto-eldonaĵojn oni povas mendi ĉe **Belga Esperanto-Instituto, 26, Oostenstraat, Antverpeno.**

Belga Esperanto-Instituto akceptas abonojn al eksterlandaj Esperanto-gazetoj.

**Verreries et Miroiterie DESMECHT & C°**

LA LOUVIERE S.P.R.L. **Tel. n-roj 223.01 - 225.37**

*Du esperantaj markoj :*

**TABULO**, por lernejtabuloj; **KATOKULO**, por signalvitroj.

VOJAĜAGENTEJO **ULTRA MONTES**

24, Koningin Astridplein, Antverpeno. — Tel. 32.76.15

17, rue d'Arenberg, Bruselo. — Tel. 12.55.02

ĈIUSPECAJ VOJAĜOJ AL ĈIUJ LOKOJ

— Vojaĝkartoj kaj rezervoj por Fervojoj, Aviadiloj kaj Ŝipoj. —

# REĜA BELGA LIGO ESPERANTISTA

ASOCIO SEN PROFITA CELO

*Prezidanto* : D-ro P. Kempeneers 106, rue General Lotz, Uccle-Bruselo.
*Vic-Prezidanto* : S-ro M. JAUMOTTE, 44, avenuo De Bruyn, Wilrijk-Antverpeno.
*Ĝenerala Sekretario* : S-ro H. SIELENS, Houwerstraat, 12, Antverpeno.
*Sekretario* : S-ro Joseph SOYEUR, 91, rue du Chêne, Seraing.
*Kasistino* : S-ino J. PLYSON, 185, rue Jourdan, Saint-Gilles-Bruselo.

## KOMBINATAJ KOTIZOJ

## Reĝa Belga Ligo Esperantista kaj Universala Esperanto-Asocio

| | A. | B. | C. |
|---|---|---|---|
| I. *Simpla membreco* (enhavas membrecon al la loka Grupo — se ekzistas — al la Ligo kaj al la internacia organizaĵo: rajtigas ricevi la nacian gazeton « Belga Esperantisto » kaj la internacian kuponaron por servoj) ... ... ... . | 25,— | 50,— | 100,— |
| *Familia membro* (same, escepte la gazeton) ... ... ... | | | 50,— |
| II. *Membreco kun individua* aliĝo al la internacia organizaĵo : | | | |
| a) *Membro kun Jarlibro* : kiel simpla membro; ricevos krome la Jarlibron kaj ĝian aldonon ... ... ... ... ... ... | 75,— | 100,— | 150,— |
| b) *Membro Abonanto* : kiel membro kun Jarlibro; ricevas krome la monatan internacian gazeton « Esperanto » ... | 165,— | 190,— | 240,— |
| c) *Membro Subtenanto* : kiel membro abonanto; pagas pli altan kotizon por helpi la movadon ... ... ... ... ... | 250,— | 275,— | 350,— |

III. *Bonfaranta Membro* memvole aldonas almenaŭ 25 fr. al sia kotizo, speciale por helpi al R. B. L. E.

Pagu al via loka grupo; se ne ekzistas, al poŝtĉekkonto 1337.67 de Reĝa Belga Ligo Esperantista.

A. Kadetoj (ĝis 18 j.); B. Junuloj (ĝis 21 j.); C. (21 j. kaj pli).

## BELGA ESPERANTO - INSTITUTO

Koopera Societo

*D-ro L. L. Zamenhof, 1859-1917. Aŭtoro de Esperanto.* — Reproduktaĵo sur poŝtkarto, de la bildo de nia Majstro pentrita kaj donacita al Internacia Esperanto-Muzeo, Wien, de artpentristo Ach. Bentos. Eldono « Esperanto », Oostenstr. 26, Antwerpen. Prezo : Fr. 2.—. La sama bildo estas havebla kiel vera fotografaĵo. Prezo : poŝtkartformato : Fr. 10.—; 24 x 30 cm., Fr. 65.—; 30 x 40 cm., Fr. 100.

Imp. Lielens, s. p. r. l., 18, rue de la Princesse, Bruxelles — Tél. : 21.10.98 — 21.87.90